



PENSEO

N-ro 363

jan. / 2022

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 33-a jaro <http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm>

Maria Nazaré Laroca (Brazilo)



Esperanto

En la komenc' estis la Poeto
Ludoviko Zamenhof, tre saĝa,
kiu pro am' vivigis la revon
per lingv' unuigi la homaron.

Esperanto, lingv' internacia,
fariĝis bela magia ponto
inter foraj popoloj diversaj.

Kaj sur la ĉiel' de Esperantuj'
belsonaj vortoj flugas inspire
gaje festante la Poezion.

Juiz de Fora, 16/04/2013.

Nerimarkeble pasis tempo,
Silento neĝa regis en ĝarde',
Solecon sentis folieto
Kaj rememoris kun ĉagren';

La trilon gajan, viglan de birdetoj,
La farbojn de somera mond',
Amuzan bruon de folioj,
La dancon de petaloj en belega rond'.

Folio malvarmiĝis sur la branĉo
Neĝeroj brilaj valsas en aer',
Dormetis arboj sub kovri' lanuga,
Malhela iĝis suno en ĉiel'.

Kaj ne rimarkis eble piedirantoj,
Ke preterflugis eta siluet',
Malsupreniĝis kun glaciaj larmoj
De aŭtuno lasta foliet'.

Rita Mkrtchyan (Armenio)



Aŭtuna folio

*Kiam rememoris amatan novelon de O. Henri
"Lasta folio"...*

Folio verda sur la branĉ' de l' arbo
Ekĝojis pro la lasta suna bril',
Naturu kvietiĝis en atendo,
Sentebla estis fora norda spir'.

Folion ne timigis frosta vento
Ĝi revis resti longe, ĝis somer',
Ekvidi vintron, kapti blankan neĝon,
Ne morti kun aliaj sur la ter'.

Wally du Temple (Kanado)



Esperanto Formiĝis Kosme

Esperanto parole spruĉeteris gaje
el ama buŝo de Ludoviko Zamenhof.
Morfoligiaj partikloj dissemiĝis vente,
helplingva pandemio, babiliga
aerosolo
por interkompreniĝo popola,
kaj el buŝoj, gutoj vaporiĝis,
kaj enspiriĝis kaj elspiriĝis
dum homoj kantis belsone,
freŝe, kaj gutis vortoj dolĉe,
fluge, en arioj de operoj,
Odiseadis poeme, originale, traduke

De arkipelagoj kaj trans montoj
 el buŝoj multgentaj; pluvegoj,
 kaj plengorĝe torentis
 tra urboj rivere. Ĉe urbodomoj
 Amasoj aplaŭdis. La dolĉa akvo
 plaŭdis
 Ĝis dolĉaj vortspruĉetoj rekontis
 Maskitajn blasfemojn
 mokkritikojn kontraŭ fenomeno nova,
 kaj dolĉakvaj eroj kolektiĝis
 sindefende por Dua Ondo,
 kuraĝe leviĝis sonoj el landoj,
 voĉoj fontanis kiel riveroj kaj deltoj
 per fundamento unuigataj
 rezistis la maskitan oceanon
 kie flosas la putraj venenoj
 de civilizacioj. Tamen gutoj literaturaj
 trairis maskojn kaj rubon,
 la lingvo osmoze vivon sentis
 akiris impeton al vivodaŭro
 ĝis vorto, dolĉakvo, kaj amo
 iĝis helplingvo matura
 kaj senteme kreis verke
 kaj onduladis haŭtkarne
 sur la pelvaj kaj ventraj
 histoj de viviga impeto,
 Kaj per ama premo
 venis penetro inspiriga
 en la konstelacio, La Lakta Vojo,
 de homa aspiro al plenumado
 io inda je generado formiĝis kosme,
 io grava okazis en la universo,
 formoŝanĝo en la historio de tempo
 de Stefano Haŭking
 kie la Alfo kaj Omego de amo
 estas nesciataj.
 Ĉu lingva stelo laŭ plano?
 Ĉu kometo kun ekscentra orbito?
 Ne gravas ĉar jam naskita
 kiel lingva energisistemo
 Ĝi ne povas morti ĉar
 Pulsas la lingvo termodinamike
 kie asteroidoj obeas kosmologiajn
 leĝojn.

Esperanto formiĝis kosme.

Yohanes Manhitu (Indonezio)



KAJO

Kie staras kajo,
 multaj boatoj venas kaj iras.
 Kie vivas kajo,
 multaj vivoj alvenas kaj velas.
 Kajo estas akva pordego.
 Kajo estas okupata punkto.
 Alveni kaj veli, mi amas.
 Resti ĉe kajo, mi malamas.
 Kie staras kajo,
 adiaŭi estas nepre.
 Kie vivas kajo,
 rideti kaj plori estas amantoj.

SOPIRO

De tempo al tempo ĉi tiu sento
 fariĝas parto de miaj tagoj
 kaj via vizaĝo ovala
 sentede tentas min.
 Estas erare kaŝi la veron,
 ke ankaŭ en mi ĉi tiu sento
 moviĝas kiel vaporo en vaporŝipo
 min puŝante al vi, ho virino.

Kefa-Timoro, januare 2010

Vi preteriras kun la luno

Meznokte aperas la luno,
 la mondo estas en silento,
 mi serĉas por vidi vian belecon
 je la lumo de la luno.
 Preskaŭ alvenas la suno
 por bani la teron per varmeco,
 vi preteriras kun la luno,
 lasante al mi bedaŭron.
 Sed la vivo ne haltas
 kvankam via beleco franda
 forlasas miajn sonĝojn,

ĉar mi ĉiam esperas.

*Esperantigita el la poemo "HO MFIN KUM MOK
FUNAN"*

Kefa, Timoro, februare 2011

Marzena Wawrziczkoa (Pollando)

deksesjara nudpiede sur la herbo
printempe ŝi rimarkis, en kio ŝi falis
tempo ĉesis, beleco prenas
pli malpeza, pli verda kaj pli bela ĉiutage

li ne kalkulas siajn jarojn, ja ne estas tempo
rosogutetoj estas bonorde fadenigitaj
dekantante kun dolĉa siropo malavare
tie li movos la floron, jen li flaros la herbon

**

la mateno estis sufiĉe hela kaj kun merloj
kantantaj
en dormajn spirojn de varmaj piedoj
en varmajn gutojn jam iomete tremantajn
Mi eligis herban susuron en la spacon

longa kulereto ŝovas ĝin
senŝeligi eroj, siringaj flokoj
en la tekruĉo sur la fajro, ĝi falas en la
bolantan akvon
flava forsythia iom aldono

freŝaj oranĝaj oleoj
printempaj floroj amasiĝis
karamelo, fojno odoras milde
li vestas mian kuirejon per novaj vestoj

Jadranka Miric (Serbio)



AL PATRO NIA

*okaze de naskiĝdatreveno de
Ludoviko .L.Zamenhof*

Pasis jaroj cent sesdek du,
certe estos tiom plu,
de naskiĝo via
kara, patro, nia!

La neŭtralan lingvon kreis vi
por homaro, sennaciecan laŭ vi,
konsistanta el dek ses reguloj
klare komprenantaj al ĉiuj uloj.
La lingvo je sep kontinentoj akceptebla
kvankam fremda lingvo, ĝi estas facile
lernebla.
Esperanto la lingvo internacia
neniam perdiĝos pro belsona alfabeto sia!

Ami aŭ militi

Sur la tablo vazo bela
en ĝi rozo, ruĝohela.
Plukita el mia florgardeno,
ŝtelis ridon de sur vizaĝmieno.
Rozo odoras mirparfume
bagatele donacita de naturo.
Vastiĝis ĉambroaerume
vagante ĝis la alta akvoturo.
Je la trajno akvoturo
nestiĝis la familio de cikoni`.
Je najbaro ilia sur la olda muro
vivas alia familio facila rekoni!
En apuda domokorto
pace, kiel belas tiu vorto,
kunvivas hundoj kaj katoj.
Amikas bestoj ĝis la morto!
Kial homoj ne povas
kunvivi pace kiel bestoj?
Anstataŭ senhalte militi eblas
batali por homaro ardame en la litoj!

Antaŭ la pluva vetero

Sur horizonto
malaperis nia monto,
kvazaŭ sidiĝus griza nubaro`.
sur la verda Kraljevica arbar`.
Suno frekvente aperis
tra pendantaj nuboj penetris,
tra fenestro brile eksunis
vizaĝon mian varmete ektuŝis.

Bidroj flugis alten
libere laŭte kriaĉante,
poste alflugis surstraten
nin gaje salutante!

Elena Popova (Bulgario)



KRISTNASKA BENO

Steloj brilas forte—
por Kristnasko kantas.
Dian amon portas,
Dian vojon montras.
Kristnasko ja venas,
kaj Dio nin benas!
Kun la cervo sledo
aĝul' donacojn portas,
de radi' sanktigitaj,
de Dio benitaj.
Sonoras la sledo—
ni al Dio kedu!

La revoj de la blanka kolombo

Iu blanka kolombo ofte venas en mian balkonon.

Rigardante tiun kvietan birdon, mi volus scii pri kio ĝi pensas. Ĉu nur pri nutraĵo?

— Ĉu la birdoj revas?

— Ne! — dirus iuj.

— Jes! — respondas mi. Se ili ne revas tage, eblas nokte dum ili dormas.

Mia blanka kolombo revas, ke ĉie estu paco, neniam milito. Ĉu vi ne kredas je tio? Pablo Pikaso vidis tion kaj ĝin pentris.

Mia kolombo vidas la bluan ĉielon kaj la blankajn nubojn, inter kiuj ĝi flugas tiel alte, ke ĝi atingu la ĝisnune ne atenditajn altecojn. Ĉu ĝi eble bruligos siajn flugilojn? Ĉu la vento malpermesos tion? Ĉu estas danĝere? Verŝajne..., sed la kolombo revas, ĝi volas vidi sian estontecon.

Ĉu ĝi sukcesos flugi trans la tempo? Se ĝi volas, ĝi povus. Laciĝante, ĝi povus sidi kaj ripozi sur iu nubo, kiel sur la tero, kaj poste denove ekflugi.

Ĉu vi ne kredas, ke la revoj realiĝas? Kiu ne revas, neniam komprenos...

Pensoj pri la ŝtono

Oni diras, ke la ŝtono estas morta materio kaj metas ĝin en la fundamentojn de la domoj, por ke ili estu stabilaj. Sed la subtenantoj de alia tezo diras, ke ĝi estas viva, ke ĝi povas moviĝi, kvankam malrapide kaj nevideble pri niaj okuloj. Kiel ĝi moviĝas kun la grandega ŝarĝo sur siaj ŝultroj?

Oni diras ankaŭ, ke la ŝtonoj estas malbenitaj homoj, kiuj iam faris ion tre malbonan. Eĉ estas malbenoj. La homoj forgesas, ke la malbenoj revenas al tiu, kiu prononcas ilin. Mi pensas kiel estus malvarma tiu domo, konstruita per ŝtonoj — kulpuloj. Oni rakontas la plej terurajn historiojn pri la jamaj kasteloj, konstruitaj per ŝtonoj kaj kun altaj ŝtonaj bareloj.

— Ne sidu sur ŝtono, vi malvarmiĝos! — diras iuj homoj. Sed eble ĝi estas malvarma, ĉar neniu ĝin amas?...

Estas homoj, kiuj ĝin amas, ekzemple la skulptistoj kaj ŝtonhakistoj. Sed ili ne prenas kiu ajn ŝtonon. Kiam la skulptartisto ĝin skulptas, iĝas miraklo, la ŝtono viviĝas kaj trapasas la tempoj por gloro de sia kreinto.

La suno kaj la akvo ĝin amas. La suno ĝin kisas kaj varmigas, nenion demandante, sed la akvo tiom multe ĝin karesas, ke ĝin detruas...

Viva aŭ morta la ŝtono servas al la homo.

Foje mi sidis ĉe iu ŝtono kaj komencis paroli kun ĝi. Ien la pensoj, kiujn mi ricevis:

— Vi vane pensas malbone pri mi. Ĉu vi ne legis la popoldirojn:

“La ŝtono pezas sur sia loko”

“Ŝtonan koron vi havu, por ke eltenu la plagojn”

Kiu iam mueligis la grenon? Oni min metas ankaŭ sur la vojoj...

Ĉu vi iam vidis la monumentojn, faritajn de la skulptistoj?

Mi petas vin, ne pensu malbone pri mi ! — sendis ĝi siajn pensojn kaj silentiĝis.

Jes, prava estas la ŝtono — ĝi estas necesa al la homoj.

Homo el ŝtono —

gloro por la skulptisto.

La temp' silentas.

Ankaŭ nun ne nur pri mono

ĉiu homo laboras...

INTIMA AMATINO

Ankoraŭ blovas la vento en vespero,

Mi pensas pri vi kun tenero,

Mi estas serena kun vi ĉiufoje.

Vi tute ne estas sen spuro,

Sed mi sopiras vin jam survoje,

Kaj songas pri vi ĉiam kun plezuro.

Sur la vojo de amo kun vi,

Ne sola mi bonvivas ĝoje.

Vi estas tiel kara al mi,

Kaj eĉ pli precipe ĉi-foje.

Eble mi devas kunligi vin atente,

Kiel vi atendas min ĉiumomente.

Mia kara, intima amatino,

Mi dankas pro via longa akompanado spirita.

Mia kara, intima amatino,

Jen la tempo tutviva la plej kore ekscita.

Ĉar mi amas vin

Ĉiufoje kiam mi vidas vin, saltas mia koro,

Mi neniel povas forgesi vin kun fidelo.

Kelkaj nuboj flosas en la blua ĉielo,

Ĉu vi ricevis de mi la benon kun fervoro?

Sen via akompano premas min embarase la doloro,

En la soleca nokto mi sopirante ne povas dormi.

Mi vere scivolas, kion vi pensas pri mi,

Kaj, ĉu mi estas grava en via koro.

Ĉar mi amas vin, mi pensas pri vi la tutan tempon,

Meditante pri via tenereco kaj via favoro.

Ĉar mi amas vin, mi pensas pri vi la tutan

tempon,

Mi nepre dorlotu ĉiun minuton kun vi en ĉiu horo!

Feino de Malproksima Loko

Malproksime estas afabla feino laŭ legendo,

Oni rigardas sopire paŝante ĉirkaŭ ŝia tendo.

Ŝia roza rideta vizaĝo aspektas kiel la brila suno,

Ŝiaj ĉarmaj okuloj viglas samkiel la hela luno.

Cele ĉiam esti apud ŝi mi volus fariĝi ŝafido,

Por ke ŝia vipo karese frapetu min kun fido.

Adiaŭ denove al Kembriĝo

Mi estas tiel leĝere foriranta,

kiel mi estis antaŭe alvenanta.

Mi mansignas adiaŭe per ĉapelo,

al la nuboj de okcidenta ĉielo.

La ora saliko de bordo rivera

estas fianĉino de suno vespera.

La bela bildo de la rebrila ondo

restas en mia profunda kora rondo.

La flosanta herbo ĉe rivero blua

ŝanceliĝas kun mirinda graco flua.

En belaj dolĉaj ondoj de la rivero,

mi volus fariĝi la akva herbero.

Sub ombro de ulma arbo la lageto

tenas ĉielarkon anstataŭ fonteto.

Inter lemnoj la reflektio frakasita estas kolora revo precipitita.

Serĉi revon volonte, remi volus mi,

al kie herbaro estas verda eĉ pli.

La boato pleniĝas de brilo stela,

kaj mi kantus laŭte al stellumo bela.

Sed mi ne povas kanti laŭ la invito,

kvieteco estas adiaŭa rito.

Somera insekto eĉ restas silenta,

ĉi nokte estas Kembriĝo pli prudenta.

Mi estas tiel silente foriranta,
kiel mi estis antaŭe alvenanta.
Mi tre delikate manikon frapetas,
ne eĉ peceton de nuboj mi elpetas.

elĉinigis



**Yi Qiao (Ĉino en
Germanio)**

Mimoza Ahmeti



Letero al la panjo

Panjo,
Neniu alia kro vin, legu ĉi tiun leteron,
Ne ĉar sekretojn ĝi enhavas, sed ankoraŭ mi
ne estas tiom forta

Por venki la dirotaĵojn:

Tirana estas tute ordinara
Kun la malvasteco de la malaltaj domoj,
Kun la laciĝintaj vintraj vojoj,
Kun dekkvinetaĝulo je la centro,
Starigita kiel mia utopio,
Kun plifortigitaj gardistoj ĉe la
ambasadejajn vojkruciĝoj,
Kun policistoj- kvazaŭ paljuniaj pegoj.

Ion antaŭsentas mi, panjo!

Neniam la ŝtato alfrontiĝis tiome al la homo,
Neniam plu la vira perfideco estis moda,
Neniam pli pezan dormon havis la noktoj
Kaj la plej perdiĝintaj, malpleniĝintaj
virinoj.

Diras mi, kara, invitas min ridante la
danĝero

Per la sendenta buŝo de la mordanta amo,
Kun la fendo en la karaktero,
Kiu estas parto de la socia fendo,

Oni ofertas min taskojn, multaj amikoj kaj
konatoj,

Ĉiuj superaj je nomoj, sed malsuperaj je
viva tensio,
Klopodas ili levi min kaptante sin al mi,
Sed estas faligante min ankoraŭ ne
leviĝinte.

Kara, aŭskultu min, ne maltrankvile,
Mi raspos ilin, raspos, mi diras,
Kvazaŭ en la viandoraspilo
En miaj versoj.

Asketismo

La horo de la kandeloj jam venis
Nur la flamoj lekas miajn nervojn kaj ilin
kvietigas

La flavo de la kresto suno por mi estas
En ĉi tiu nokto elĉerpiga
Sen vizaĝo, sen sekso, sen ama stelo.

Estas mi la asketulo plej sensuala okazinta
La kolorojn, aromojn, ebriojn, amanta
Lekulo de la gustoj, gusto ne gustumita
Fastante brulanta.

La mankoj frenetikaj deziroj estas
Ĝiskiam la kandeloj estingiĝas.
La mondo facile envana estas
Ĉar ĝin mi faris
Kaj, ĉar mi gustumis
Tempon por tiel bone perfektigi ne havis.

Neniam al mi oportune la aferoj glatis..Enirus
Ĉiam obstaklo enkaŭ, kiu
Kondukus la penson al la virilo
Kaj ĉi tiu, kvazaŭ estus cerbo, malvarmiĝus
Kaj de la akto foriĝus.

Restis mi trinkante sukojn kaj spicaĵojn
Dolĉaĵojn kaj acidaĵojn
De la miaj esencoj.

La amo
La agonio

La profundeco

La pligrandiĝo

La etendiĝo

la eĥado...

Elalbanigis



Bardhyl Selimi

(Albanio)

El Ĉina Antikva Poezio

Li Qingzhao (1084-1151)



—laŭ melodio *Ĉiama ĝojo de renkontiĝo*

Subiranta sun' aspektas tre mirinda
kiel fandiĝinta oro,
nuboj ĉe vespero amasiĝas bele
kiel jada floro.
Kie nun vi, mia kara,
trovas vin en la foro?
Salikvergoj freŝe verdaj
vualitas per vaporo,
flut' eligas la arion de disiĝo
jen en tonoj de ŝajn-ploro.
Ĉu mi sentas iom da printempetoso
en la koro?
Ĉe la Festo de Lanternoj* la vetero
ja serenas kun favoro,
ĉu neatendite venos vent' aŭ pluvo
en necerta horo?
Mi rifuzis de amikoj la inviton
spekti laŭ ilia volo
la lanternojn per kaleŝoj.
Havas mi por tia gaja folo

neniom da intereso kiel miaj
poezi-amikoj kun fervoro.

En pasintaj tagoj mia vivo
ja senĝenis en la buduaro.
Tiam mi atendis sopireme
lantern-feston jen en popularo.
Por l' okazo ni surhavis
orfadenan salikvergon en hararo
kaj ĉapelon kun smeralda peco,
konkurante belvestite por komparo
inter la fratinoj en la rondo.
Sed nun kvazaŭ en koŝmaro
mi magriĝis kun taŭzantaj haroj
ne kombitaj pro spirita falo.
Mi preferas ĉe la pord' rigardi
la spektaklon ja kun jovialo,
kaj aŭskulti post la pordkurteno
al ridsonoj kaj paroloj, kun amaro.

**La Festo de Lanternoj okazas je la 15-a de la unua lunmonato. Dum tiu tago oni spektas lanternojn en stratoj aŭ en aliaj lokoj.*

—laŭ melodio *Kvazaŭsonge*

Lastnokte pluvo frape gutis
post venta preterpaso.
Profunda dormo ne sukcesis
eligi vinebrion per frakaso.
Demandis mi servoknabinon,
“Al begoniaj floroj sub pluvĉaso
kio okazis?” Ŝi respondis,
“Senŝanĝaj ili restas sur teraso.”
“Vi sciu, sciu. Jam la verdo estas
en graso kaj la ruĝo en malgraso.”

—laŭ melodio *Silk-lava roĵo*

Printempa etoso en majo
ŝvebflugas en hela aero.
El la incensujo spiralas
la lastaj strietoj de fum' kun leĝero.
Mi sur kapkuseno pigremas
sen kapornamaj' en apero.

Hirundoj ancor' ne revenis el foro,

najbaraj knabinoj tordigas herb-tigojn*
 sur tero.
 Prundrupoj senĉese faladas,
 salikaj floketoj flirtdancas jen ĉe la rivero.
 Sporadaj pluvgutoj tiktakas,
 humidas pendol' ĉe vespero.

**Tordigi herb-tigojn estas ludo, en kiu oni elektas pli aŭ malpli fortajn herb-tigojn por tordigi unu la alian por pruvi, kies elektita herb-tigo estas pli forta.*

—**laŭ melodio Silk-lava roĵo**

Mi ne emas hartuberon fari
 pro printempaj ĝeno kaj enuo.
 Ĉe vespero en la korton
 vento blovas kun susura bruo.
 Sur ĉielo flosas nuboj
 kaj la luno lumas en malhela bluo.

La incens' rezina jam ne brulas
 en la anasforma uv' el porcelano.
 El la kulvualo ĉerizruĝa pendas
 kvasto silka de ornamo.
 Ĉu rinocer-korn' pendanta ĉe la lito
 povus liberigi l' ĉambron de la
 frost-tirano?

—**laŭ melodio Sola sovaĝansero**

Matene mi vekigis en kan-lito,
 ĉagrenoj svarmis al mi kiel flu'.
 Incens' bruliĝis jam ĝis cindro
 kaj l' jada incensuj' ne varmis plu.
 Glacie mia koro fridas splene.
 Aŭdiĝas flut-ari' pri umefloroj,
 disfloras floroj ja kun vivĝu'.
 Heroldas ili la printempan venon
 alprokmiĝantan el ĉiela blu'.

Ventpluvo flirte disverŝiĝas,
 mi sola sidas jen en mia buduaro.
 Ĝenplene mi jam afliktiĝas
 kun varma larmo-falo.
 Vanuis flut-ludant' kaj lasis
 malplena l' domon en malklaro.
 Ve, kiu povus spekti kune kun mi

la umeflorojn pompajn en la valo?
 Eĉ mi deplukus frondon kaj neniu
 en mondo ĝuus kun mi ja en paro!

—**laŭ melodio Silk-lava roĵo (Longigita tonalo)**

Post malsano miaj haroj grizas
 jam ĉe la tempi'.
 Mi rigardas la lunarkon
 tra fenestro sen pasi'.
 Per amom' kun tigoj faras
 dekoktaĵon por trinkaĵo mi,
 ne plu ĝenas mi prepari
 teon sen raci'.

Mi komforte legas
 apogante min sur kapkuseno.
 Eksterdome pluvo plibeligas
 la pejzaĝon en ĝardeno.
 L' elegantaj osmantfloroj,
 por senigo de malsan-kateno
 mia, akompanas min tuttage,
 liberigas min je ĉagreno.

elĉinigis



Vejdo (Ĉinio)

Anonima (?-?)*

Je la Ĉielo!

Je la Ĉielo
 mi ĵuras,
 ke mi amas kaj vin amos
 por ĉiam kaj eterne.
 Nur se ebeniĝus monto,
 elsekiĝus sin rivero;
 vintre bruus tondro,
 neĝus en somero;
 kunfandiĝus
 la ĉielo kaj la tero;
 mi forlasus mian amon!

**La poeto vivis dum la periodo de dinastio Han (202 a.K.-220 p. K.)*

Cao Zhi (192 - 232)

Poemo farita en sep paŝoj

Faboj kuirigās, sube brulas fabotigoj.
En varmega poto faboj larmas kaj lamentas.
Origine ambaŭ kreskis el samaj radikoj.
Kial fabotigoj tiel bruskas kaj turmentas?

Tao Yuanming (ĉ. 365 - 427)

Drinkado

(5)

Mian domon tie mi instalas,
kie agas homoj, sed sen bruo
de kaleŝoj. Al mi oni faras
la demandon: Kiel tia ĝuo

povus vin karesi? Kun animo
pura kvietecon vi jam spektas.
Krizantemojn, en hejma proksimo,
ĉe l' eosta heĝo mi kolektas;

reflektiĝas en okuloj miaj
sudaj montoj. En rufa vespero
plenas atmosferoj idiliaj;
kaj reflugas birdoj en l' aero.

Vera suko tie ĉi sin trovas,
tamen ĝin klarigi mi ne povas.

Xie Lingyun (385 - 433)

Ascendo al la sola insulo en la rivero

Jam tedas min l' sudlanda travojaĝo,
kaj nun min ravas norda la pejzaĝo.
La vojo al la plezur-loko nova
sinuas, kaj ne multas temp' almova.
Al ĝi mi do l' torenton transveturas,
la ĉarmo river-meze sin konturas.
Kun nuboj harmonias sun' en brilo,
kaj kunfandiĝas akvo kaj ĉielo.
L' insul' tro belas por homa admiro,

kaj kiu l' belon notus pro ĉi miro.
Imagu kiel sorĉas fe-spirito—
ĉi mondo forlasitus de ermito.
Mi nun komprenas, ke en tiu sfero
ekzistas vivlongeca maniero.

Anonima (?-?)*

Chile-kanto

**

La stepo Chile dissterniĝas,
kaj tie la Yin-monto restas.
La blua ĉielo volbiĝas,
kovrante ĉion, kio estas.

La firmament' sublimas,
kaj la paŝtej' senlimas.
Kiam sin movas blovoj,
videblas ŝafoj, bovoj.

*Tiu ĉi poemo estis verkita dum la periodo de la Sudaj kaj Nordaj Dinastioj (420-589).

**Chile, nomo de antikva etno en Ĉinio.

elĉinigis



Minosun (Ĉinio)



Zhuangzi

ĈAPITRO DUDEK-SESA

La eksteraj estaĵoj

§26-07

Huizi diris al Zhuangzi: “Viaj vortoj estas senutilaj.”

“Nun ke vi scias, kio estas senutila, mi povas paroli kun vi pri tio, kio estas utila,” diris Zhuangzi. “Kvankam la tero estas vasta kaj granda, sed tio, kio utilas al vi, estas nur loketo,

kiu sufiĉas por subporti viajn piedojn. Sed se vi forfosos la teron ĉirkaŭ viaj piedoj ĝis vi povus atingi la inferon, ĉu tiam estos ankoraŭ utila la peceto da tero, sur kiu vi staras?”

“Certe ne,” diris Huizi.

“Tiuokaze,” diris Zhuangzi, “estas evidente, ke la senutileco estas utila.”

§26-08

Zhuangzi diris: “Se la homa menso povas libere vagadi, kiel do li povas ne esti libera kaj senzorga? Se la homa menso ne povas libere vagadi, kiel do li povas esti libera kaj senzorga? Iuj homoj permesas al sia menso laŭvole vagadi kaj agas obstine kaj strange. Ho ve! Ili ne povas esti konsiderataj kiel homoj kun perfekta inteligenteco kaj alta virto. Ilia reputacio malboniĝas, sed ili ne pentas pri sia konduto; ili perversiĝas, sed ili rifuzas sin ŝanĝi. La rilato inter la reĝo kaj la regato estas portempa; kiam la tempo ŝanĝiĝas, tiam por ili ekzistas nenia kialo malestimi unu la alian. Tial estas dirite, ke la perfekta homo ne havas stagnan menson.

“Admiri la antikvecon kaj malestimi la nuntempecon — tio estas la dispozicio de la klerulo. Se vi rigardas la nuntempecon laŭ la vidpunkto de Shiwei en la antikveco, vi apenaŭ povas eviti antaŭjuĝon. Nur la perfekta homo povas libere vagadi en la vulgara mondo sen ia ajn antaŭjuĝo kaj sekvi la vulgaran mondon sen perdi sian individuecon. Li ne studas la tradiciajn instruojn, sed li ne forpuŝas ilin, kvankam li ne provas ilin.”

§26-09

La okuloj, kiuj komuniĝas kun la ekstera mondo, kreas vidadon; la oreloj, kiuj komuniĝas kun la ekstero, kreas aŭdadon; la nazo, kiu komuniĝas kun la ekstero, kreas flaradon; kaj per la komuniĝo kun la ekstero la buŝo kreas la gustumadon. Tio, kio ebligas komprenon pri la mondo, estas la inteligento; kaj tio, kio estigas la inteligenton, estas la virto. En ĉiaj okazoj la komuniĝa vojo neniel devas esti obstrukcita. Se ĝi estas obstrukcita, la

komunikiĝado estos ĉesigita. Se la komuniĝado estos ĉiam ĉesigita, tiam malordoj estiĝos; se malordoj estiĝos, diversaj malbonoj naskiĝos.

Ĉiuj estaĵoj, kiuj havas konscion, dependas de la vitala energio por sia ekzistado. Se la vitala energio ne estas sufiĉa, tio ne estas la kulpo de la ĉielo. La ĉielo senĉese provizas la komunikaĵajn vojojn per la vitala energio tage kaj nokte. Estas la homo, kiu ŝtopas siajn proprajn aperturojn. La utero estas denaske kava kaj la menso estas denaske vaka. Se la ĉambro ne estas sufiĉe spacohava, la edzino kaj ŝia bopatrino facile falos en kverelojn; se la menso ne estas sufiĉe larĝa, la sep sensoj facile venos en konflikton unu kun la alia. La arbaroj kaj la montoj altiras la homojn, ĉar la homoj sentas agrablecon en ili.

§26-10

La virto superas sian naturan limon tiam, kiam ĝi celas la famon; la famo troiĝas tiam, kiam ĝi emas paradi. La intrigo kaj la artifiko naskiĝas en la kriza okazo; la sprito estiĝas el la disputoj; la obstineco rezultas el la konservemo; la aferoj de la regado estas kondukataj por la oportuneco de la ĝenerala publiko. Kiam ĝustatempa pluvo falas en la printempo, la herboj kaj la arboj rapide kreskas. Post kiam oni pretigas siajn sarkilojn kaj faras sarkadon, pli ol duono de la elsarkitaj herboj denove elkreskas sen ke oni scius kial.

§26-11

La kvieteco helpas trovi la sanon; la masaĝo sur la palpebroj helpas preventi la kadukiĝon; la animpaco helpas estingi la ekscitiĝon. Malgraŭe ĉio ĉi tio estas utila nur al tiuj, kiuj estas troŝarĝitaj per laboro mensa aŭ korpa. La homoj, kiuj ĝuas internan pacon kaj senzorgecon donas nenian atenton al tiu ĉi spertado de la lacigitoj. La sanktulo ne zorgas pri tio, kion faras la sagaca homo por mirigi la mondon; la saĝulo ne zorgas pri tio, kion faras la noblulo por mirigi la regnon; la noblulo ne zorgas pri tio, kion faras la vulgarulo por

adaptigi sin al la tempoj.

§26-12

Proksime de la pordego Yan de la ĉefurbo de la regno Song vivis iu viro. Kiam liaj gepatroj mortis, li malgrasigis sin por esprimi sian profundan funebbron kaj tiel ricevis gravan postenon en la ĉefurbo. Liaj samurbanoj, sekvante lian ekzemplon, treege malgrasigis sin, kaj rezulte duono de ili mortis.

§26-13

Iam la reĝo Yao proponis cedi sian tronon al Xu You, kaj tiu forkuris. Kiam la reĝo Tang proponis cedi sian tronon al Wu Guang, tiu forte koleriĝis. Aŭdinte pri tio, Ji Tuo retiriĝis kun siaj disĉiploj al bordo de la rivero Kuanshui kaj ermite vivis tie. Multaj princoj kaj dukoj iris montri al li simpation. Post tri jaroj Shentu Di sin dronigis en rivero pro la sama kialo.

§26-14

La naso estas uzata por kapti la fiŝon, sed kiam la fiŝo estas kaptita, oni ofte forgesas la nason. La kuniklokaptilo estas uzata por kapti la kuniklon, sed kiam la kuniklo estas kaptita, oni ofte forgesas la kuniklokaptilon. La parolo estas uzata por esprimi la ideon, sed kiam la ideo estas esprimita, oni ofte forgesas la parolon. Kie do mi povus trovi iun, kiu jam forgesis sian parolon, kaj interparoli kun li?

elĉinigis



Wang Chongfang

(Ĉinio)

Ĉineske

Jadranka Miric (Serbio)

Decembro festas

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Decembra

stranga pluvolag’.

Nur unufoje vidis

mi lumon dum hela tag’.

Antaŭ fulmomag’.

Noktiĝis

frue preskaŭ de

mateno. Kvazaŭ vidis

mi neniam nubojn. Ne

nigran surstrate.

Bluiĝis

montaro fore.

ankoraŭ sen neĝa. Sun’

fojfoje brulis ore.

tuŝas min kore!

Urbanoj

kolektiĝis por

ornami altan pinon!

Lumigita pino laŭ mor’.

Saluton el kor’!

Verda stel’

jen gaje flirtas

nin honore simbolas.

Por espero ni agas.

Kore progresas!



Fino de la jaro

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Ŝanĝiĝis

klimato. Same

jarsezonoj. Branĉaro

nuda ploras sename.

Vintras malvarme.

Decembro
plenas de festoj.
ornamitaj arboj nin
alogas per briletoj
el ardukoloroj.

Jarfino
proksimiĝas. Ho,
kiom da amuzaĵoj
nin atendos. Delekto
de la dompino!

Virusa
pandemio tre
malbone influis nin.
Diru al la festoj NE.
Ĉu rifuzi? Ve.

Aero
neĝe odoras.
Nazon freŝeco pinĉas.
Ekscitaj ni tre miras
dum forte spiras.

**Sopir-al-sudo (ĉine: Yijiangnan): ĉina fiksforma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo xa,xa,a (x=senrima).*

Lenke Szász (Rumanio)



Alparolo

Iam mi legis, ke ankaŭ la plantoj sentas kaj pensas simile al ni, homoj. Kaj ke ili reagis al la amoplana alparolo per pli bona kreskado, florado.

Ĉu vere aŭ ne, mi provos. Ja mi havas neniun kun kiu babiladi.

Elinter la multaj plantoj en florpotoj sur la fenestrobretoj, mi elektas iun, kiu estas sola kiel mi. Se ĝi sentas kaj komprenas mian parolon, ni havas komunan temon, komunan sopiron.

Kara figarbeto,
pardonu min, ke mi forportis el via hejma lando, el la suplena greka insulo, Thassos, kaj nun ni sopirplene rigardas tra la fenestro la sensunan, malgajan decembran pejzaĝon. Nun ankaŭ en via hejmloko la vidaĵo verŝajne estas simila. Vi estis nur branĉeto, kiam mi ekprenis vin el la patrina arbo. Mi admiris ĝin, ĉar ĝi elkreskis el fendo de roko. Kiamaniere la semo penetris en ĝin? Kiom da teron ĝi trovis en tiu malvasta fendo por burĝoni? Mistero. Mi admiris ĝin, kaj deprenis el la granda kreskaĵo etan branĉeton. Por kunporti en mian hejmlandon. Por kunporti vivan memoraĵon el la amata Grekio. Kiam mi ne plu havos forton denove elteni la longan busvojaĝon, kiam mi estos eĉ pli maljuna, vi memorigos al mi la amatan insulon. Vi vidis min ĉiun tagon piediradi el la vilao, en kiu mi loĝis, sola en la ĉambro, tra arbaro ĝis ne tro malproksima altaĵo. Tie mia animo pleniĝis per la vidaĵo de la bluega maro. En aero ŝvebis bonodoro de la mediteranea plantaro. Mi estis parteto de la naturo, kaj sentis min, ekde ĉiam ekzistanta, ĉiam ekzistonta – eble nur en alia korpo. Ĉu mi estos arbo, ĉu mi estos birdo aŭ lacerto?

Mi forgesis, ke tiu ferieto daŭros nur unu semajnon, kaj sekvos laciga, longa vojaĝo reen, en mian landon. Vi estis kun mi volvita en malseka tuketo. En saketo mi kunportis ankaŭ iom da lokan teron. Kaj vi ekburĝonis en florpoto je mia ĝojo. Vi kreskis, kreskadis, kaj nun via hejmo estas mia hejmo. Kune ni rigardas la grizan ĉielon kaj revas, revadas pri la sunplena insulo en la bluega maro.



Eldonas Redakcio de *Penseo*
Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Vejdo)
Retadreso: vejdo@163.com
www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm

